

BJELOVARA ESPERANTISTA SOCIETO  
Vlatka Mačeka 14  
43000 Bjelovar  
esperanto.bjelovar@gmail.com

Bjelovar, la 20-an de aŭgusto 2018

**La 6-a renkontiĝo**  
**„ESPERANTISTOJ DE BJELOVAR AL SIA URBO”**  
**Unua komuniko**

Karaj amikoj,

Bjelovara esperantista societo invitas vin jam la sesan fojon partopreni sian manifestacion „Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo”, kiu ĉi-jare okazos la 22-an kaj 23-an de septembro, kiel parto de la festado de Tago de la urbo kaj Tago de bjelovaraj defendantoj.

**Programo:**

SABATO, la 22-an de septembro 2018

- Alveno de la gastoj, vizitado de la urbo,
- Interkona vespero en la dolĉaĵejo „Zagorje”, Bjelovar, Ivana viteza Trnskog 15, je la 19h00

DIMANĈO, la 23-an de septembro 2018

- malfermo de ekspozicioj en la vestiblo de la Popola biblioteko „Petar Preradović” Bjelovar
- deklamkonkurso, por kiu povas aliĝi ĉiujaj kategorioj de deklamantoj
- ronda tablo: „Kontribuo de esperantistoj al la kultura progreso de Bjelovara tra la historio”
- prezento de la Esperanta traduko de la romano de Goran Tribuson „Fruaj tagoj”
- post la programo okazos komuna tagmanĝo kaj kunestado

Ni petas, ke vian partoprenon vi anoncu ĝis la 10-a de septembro 2018 al:  
098/181-7350 (Zdenka Polašek), 091/797-3484 (Franjo Forjan), aŭ al:  
**esperanto.bjelovar@gmail.com**

Al la sama adreso anoncu ankaŭ vian partoprenon en la deklamkonkurso (same ĝis la 10-a de septembro) – la propozicioj estas alkroĉitaj al ĉi tiu komuniko.

La kotizon de 40,00 kunaĵoj por la komuna tagmanĝo oni pagu al konto de Druŝto esperantista Bjelovara: HR1224020061100615259. Kun la aliĝo informu nin ĉu vi deziras vegetaranan manĝon. Aliaj informoj pri ĉi tiu manifestacio sekvos baldaŭ en la Dua komuniko.

Bonvenon – Dobro nam došli !

Prezidanto de Bjelovara esperantista societo:  
Franjo Forjan

Bjelovara Esperantista Societo kaj  
Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto

invitas vin partopreni en la

**6-a DEKLAMKONKURSO**

la 23-an de septembro 2018 en Bjelovar

La Deklamkonkurso estos parto de la programo „Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo”, okazonta honore al Tago de la urbo Bjelovar kaj Tago de bjelovaraj defendantoj. Partopreni povas junaj esperantistoj, lernantoj de elementaj, mezlernejoj, studentoj el Kroatio kaj eksterlando kaj plenaĝaj esperantistoj.

Temo: deklamado de originala Esperanta poezio kaj poezio tradukita en Esperanton.

Premioj:       1. Pokalo al plej bona deklamanto  
                  2. Medaloj  
                  3. Libropremioj  
                  4. Diplomoj por ĉiuj partoprenantoj

La deklamadon prijuĝos ĵurio konsistanta el tri membroj, kiujn nomumos la organizantoj.

Bjelovara Esperantista Societo organizos senpagan tagmanĝon por ĉiuj deklamantoj, kaj la vojaĝkostojn pagos la partoprenantoj mem. Deklamantoj povas esti individuaj aŭ/kaj literatur(em)aj grupoj.

Aliĝojn bonvolu sendi al:

Druĝivo esperantista Bjelovara  
Vlatka Maĉeka 14, 43000 Bjelovar  
esperanto.bjelovar@gmail.com